


Se vi hezitas kiun lim-aranĝon elekti,...

Kiam vi hezitas elekti aŭ metrajton-perdantan lim-aranĝon 'A', aŭ inversan lim-aranĝon 'B', obeu jenan pensmanieron.


Se ekzistas alia lim-aranĝo 'C' preskaŭ samvalora al 'A', vi unue metu la inversan lim-aranĝon 'B', kaj lasu kontraŭulon meti 'A', sekve vi metu 'C'. {La gajno/malgajno kalkuliĝas $=B-A+C-(\text{metrajto})$ }.

Se ne ekzistas alia lim-aranĝo preskaŭ samvalora al 'A', en oftaj kazoj vi unue metu la metrajton-perdantan lim-aranĝon 'A', kaj lasu lasu kontraŭulon meti 'B'. {Kaj sekve 'C', supozante la alian plej valoran lim-aranĝon 'C'. La gajno/malgajno kalkuliĝas $=A-B-C+(\text{metrajto})$. Precize, vi devus rimarki restajn lim-aranĝojn, kiu aperas kiel 'metrajto' en la formulo.} Ĉi tiu Problemo 1 apartenas al la kazo. {Nigro devus elekti sinligon N9 en diagramo 84, ne bato-kaj-sinligon N9 kaj N11 en diagramo 86.}


{paĝo 42 de la origino}




Diag. 89 Krome, post N17 en la ĝusta kurso, se Blanko elektus saltantan-tuŝmeton B18,...



Diag. 90 (N31: rekapto sur supro de N29. Finiĝas ĉe la 31a meto. Nigro venkis je unu poento.) Ĝustaj estas lim-aranĝoj ekde N19 ĝis N31. Neniom da gajno/malgajno komparante kun la ĝusta kurso. Nigro venkis je unu poento.
{paĝo 43 de la origino}




Diag. 91 Alie, post N21 en la ĝusta kurso, se Blanko elektus minaco-kaj-sinligon B22 kaj B24, la rezulto estas sama. Vidu la sekvan diagramon ekde N25,...
{paĝo 44 de la origino}



Diag. 92 (Finiĝas ĉe la 29a meto. Nigro venkis je unu poento.) Ĝis N29, ankaŭ en ĉi tiu kazo Nigro venkis je unu poenton. Vi mem kalkulu.

Kiel montritaj supre, en la lasta stadio de lim-aranĝo, plej ofte ekzistas multaj ĝustaj metordoj. Ĉi tio pravas en preskaŭ ĉiuj ludoj. Do se vi atingas 'ŝlosilon' por la lim-aranĝo, ne bezonas detale prizorgi pri ĉiujn metojn por gajni. Vi studu la problemojn ĉi tie kaj atingu la 'ŝlosilon'.

{paĝo 45 de la origino}



Diag. 93 (N29: rekaptu sur supro de N27. Finiĝas ĉe la 29a meto. Blanko venkis je unu poento.) Ĉe la fino de la studo pri problemo 1, kontraŭ B16, la bato, sur la ĝusta procedoj, se Nigro erare respondas kiel N17, Blanko metrajton-tenante metas B18 kaj B20, kaj la venko/malvenko renversiĝas. Ĝis N29, Blanko venkis je 1 poento da diferenco.

{paĝo 46 de la origino}